

Usona

Esperantisto

Bulteno de Esperanto-USA - N° 2024:4

Ĉiam antaŭen

Anoncoj	p.3
Paid Summer Intern Opportunity; ESF Donation Matching; New Lernu! App; Bookmark Design Contest; Grave: Ŝanĝo de la datoj de kaj UK, kaj IJK en 2025; Nova Komitato pri Prizonulaj Rilatoj; Gratulo de UEA pro la dekjariĝo de AMO	
Sep-Nov Board Activity	p.6
de la estraro	
Summary of board meeting minutes for September through November, 2024.	
La vivo de Peĉjo	p.7
ŝercoj • Timothy BORONCZYK	
La tridek-kvara en serio de Timothy BORONCZYK.	
Hundo en la parko	p.7
facila teksto • Lee MILLER	
Kie estas la mistera hundo?	
Politikoj — La kruroj sur kiuj neprofitcelaj firmaoj staras	p.8
de la kasisto • Matt BROOKS	
Financaj, investaj, kaj konformeckaj politikoj formas la fundamenton de bona administrado kaj travidebleco.	
Lavotaĵoj	p.9
beletre • Debra HAMEL	
Kiel purigi solecon?	
About Compound Words	p.9
language corner • Lee MILLER	
Two basic principles for creating compound words in Esperanto.	
Eta urso en biblioteko	p.9
loke • Ellen EDDY	
Ĉu vi vidas ĝin?	
Solvoj de enigmoj el n-roj 2024:2, 2024:3	p.10
enigmo-solvoj	
Gratulon al niaj solvintoj Rafa NOGUERAS kaj Madeleine CANAVESE!	
USS Wisconsin	p.11
historie • Logan HALL	
Restaĵo de malnova mondo.	
Pelarboj	p.13
senintenca esperantaĵo • Logan HALL	
Ili ŝajnas malpli agrablaj ol kristnaskaj arboj.	
Mikronoveloj	p.14
Novaj centvortaĵoj.	

Anoncoj

Paid Summer Intern Opportunity

Would you like to use your Esperanto during the summer? An intern is needed to work with the Esperanto-USA (ELNA) archive at the University of Massachusetts Amherst and possibly at the Esperanto collection at California State University Domingues Hills. If you are interested, and to find out details, contact Chuck Mays, Executive Director of the Esperantic Studies Foundation at chuck.mays@esperantic.org, Tel 919 744 8003.



New Lernu! App

Ruth "Margo" KEVSS-COHEN

La Lernu-apo estas preta! Ĉi-momente ĝi pretas nur por anglaparolantoj. Post plurmonata kunlaborado, nia eta volontula sendependa teamo lanĉas senpagan apon ĉe "EdApp".

The Lernu app is ready! At this time, it is for English speakers only. After a several-month-long volunteer collaboration, our little independent team is launching a free app on the platform "EdApp".

link.edapp.com/VCRevR4F0Bb



Bookmark Design Contest

Karlo GERMANY

This contest was first announced in *UE* № 2024:3; the editors encourage readers to participate while the contest is still active!

How would you like a chance to win some extra money by promoting Esperanto? Esperanto-USA and the Promotions Committee are sponsoring a bookmark design contest for the purpose of drawing attention to our beautiful language.



You are invited to design creative bookmarks to pique the interest of people who have never heard of Esperanto. The goal is to invite them to use the QR code, which will display more information about Esperanto and Esperanto-USA.

The prizes are:

- **First Prize:** \$250
- **Second Prize:** \$150
- **Third Prize:** \$100

So send us up to three amazing, creative designs! Here is what we are looking for:

1. Entries must be submitted by midnight US eastern time on March 31, 2025.
2. The design must be submitted in a format that can be edited with Canva Pro.
3. A PDF version of a design is also required for easy viewing by a panel of judges.
4. All fonts that are used must be free to use and editable in Canva Pro (see link above).
5. The bookmark size will be 6" x 2". We have chosen this size because it's convenient for books in Little Free Libraries.
6. All bookmark design entries are the property of Esperanto-USA.
7. No copyrighted designs or elements can be used.
8. Up to three designs can be submitted by each contestant. Each entry must have a unique name and must identify the contestant.
9. All entries must be the work of the contestant. AI (Artificial Intelligence) can be used as inspiration. The exclusive use of AI is discouraged.

10. Entries will be uploaded to a Google Form that will collect information so prize money can be sent. Be sure you submit both a PDF and an editable file.
<<https://mallonge.net/EUSA-bookmark-form>>

Here are some criteria for a winning design:

1. An attractive design such that it will not be discarded immediately. Ideally the person who has the bookmark will want to keep it and use it.
2. Only enough text to raise interest to go to a E-USA webpage to find out about Esperanto.
3. Promotes Esperanto while avoiding stereotypes. An example of a stereotype is a green bookmark with a white star.
4. Something unique is desired that motivates people to visit the webpage to find out what Esperanto is.
5. The goal is to expose the public to the word “Esperanto” (language and community) and not to sell Esperanto or recruit people to learn Esperanto. Those seeking more information will decide to learn Esperanto, or not, based on the information they find on the webpage.
6. Each design should allow room for a QR code and wording similar to: “To find out more: www.esperanto-usa.org/more” (exact link and page to come at a later date).
7. Here are some suggested places to put the bookmarks:
 - Public libraries, to be made available to the public.
 - With books available in Little Free Libraries.
 - Bookstores.
 - Events where there is an Esperanto information booth, such as: international festivals, ham radio events, sci-fi conferences, etc.
 - Other places as appropriate.

If you have any questions please contact karlo.germany@esperanto-usa.org.

Dankon kaj ĝis baldaŭ!

Grave: Ŝanĝo de la datoj de kaj UK, kaj IJK en 2025

anoncoj

UEA informas, ke pro neatenditaj cirkonstancoj la dato de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) devis esti ŝanĝita. La UK, antaŭe planita por 19–26 Julio 2025, nun okazos la sekvan semajnon, inter la 26-a de Julio kaj la 2-a de Aŭgusto 2025.

La ŝanĝo estis necesa por eviti koincidon kun alia pli granda evento en la regiono de Brno, kio kaŭzus nedisponeblecon de loĝlokoj kaj konsiderindan altigon de ties prezoj dum la kongresa periodo. UEA jam estas en rekta kontakto kun la ĝisnunaj aliĝintoj.

Nuntempe oni pretigas ĉiujn bezonatajn datumojn por la Dua Bulteno, kiu aperos ĝis fino de la jaro. En ĝi haveblas favorprezaj tranoktebloj, samkiel interesaj ekskursoj, inkluzive de la antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj.

La dato-ŝanĝo okazis kunlabore kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La 58-a ILEI-Kongreso, planata por okazi en Beogrado, Serbio, nun okazos la semajnon antaŭ la 110-a UK. La teamoj de la 110-a UK kaj de la 58-a ILEI-kongreso devos kunlabori ankaŭ por ebligi bustransportadon de kongresanoj rekte inter la du kongresejoj, de Beogrado ĝis Brno. Pliaj informoj pri la 58-a ILEI-kongreso, kiel la aliĝilo, aperos baldaŭ ĉe <https://www.ilei.info>.

Redakcia noto: Pro tiu situacio, ankaŭ la 81-a IJK en Cisarua, Indonezio estis postigita. Ĝi nun okazos de la 9-a ĝis la 16-a de Aŭgusto, 2025. Pliaj informoj troveblas ĉe la retejo de IJK 2025: <https://ijk2025.tejo.org/novaj-datoj/>

Ĉi tiu anonco estas adaptita de Gazetara Komunikado de UEA laŭ ĝia permesilo [CC BY 4.0](https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/).

Nova Komitato pri Prizonulaj Rilatoj

anoncoj

Ĉu vi sciis, ke Esperanto estas lernata eĉ en usonaj prizonoj? En diversaj prizonoj trans la lando, malliberuloj lernas Esperanton kaj eĉ instruas ĝin al aliaj malliberuloj. La Centra Oficejo ricevas poŝtleterojn de ili; malliberuloj kutime ne havas aliron al la interreto, do ili serĉas lernmaterialojn kaj korespondantojn por praktiki uzi Esperanton. En *Usona Esperantisto* 2024:1, ni publikigis kelkajn tiajn leterojn por helpi tiujn lernantojn trovi korespondantojn. Pro nova iniciato de la Centra Oficejo, Esperanto-USA nun starigas novan komitaton por krei pli sekuran manieron korespondi anonime kun prizonuloj. Komitatoj korespondos pere de la adreso de la CO; personaj poŝtadresoj restos privataj.

Eble vi zorgas pri la sekureco de viaj datumoj, kaj ne volas, ke malliberuloj konu vian adreson. Ni ĉe Esperanto-USA subtenas kaj respektas tiun elekton, kaj lastatempe la estraro decidis ne plu sendi paperan membroliston ekde 2024, pro risko de misuzo. Ni prilaboras ŝanĝon al pli sekura cifereca membrolisto, per kiu ni planas protekti pli bone la datumojn de nia membraro kontraŭ nedezirataj kontaktoj. Pli da detaloj baldaŭ venos per retroŝta anonco. Malliberuloj estus limigitaj al kontakto nur kun la Komitato pri Prizonulaj Rilatoj.

Se vi jam korespondas kun prizonulo, aŭ interesiĝas tion fari, ni invitas vin iĝi membro de nia komitato. Kontakti nin per la CO: amanda.schmidt@esperanto-usa.org.

Gratulo de UEA pro la dekjariĝo de AMO

Duncan CHARTERS

Okaze de la dekjariĝo de la AMO-seminarioj, mi sendas al Stefan MacGill kaj la tuta AMO-komisiono elkorajn gratulojn kaj dankojn pro la grandega laboro, kiun reprezentas tiu organizado, kaj la rezultoj, kiuj plifortigis la agadon por Esperanto tra la tuta komunumo. Plurajn seminariojn mi persone partoprenis, ĉiam konsciante unu el iliaj bazaj celoj: plikapbligi niajn aktivulojn por efike reprezenti nian lingvon antaŭ la publiko.

Antaŭ jardekoj, alia prezidanto de UEA, profesoro d-ro Ivo LAPENNA, insiste atentigis, ke la esperantistoj atentu pliklerigi pri la lingvo, ĝia historio kaj aktuala uzado. Kiam

New Prisoner Relations Committee

Did you know that Esperanto is being learned even in U.S. prisons? In various prisons across the country, inmates are learning Esperanto and even teaching it to other inmates. The Central Office receives snail mail from them; inmates usually don't have internet access, so they reach out for learning materials and pen pals for practicing Esperanto. In *American Esperantist* 2024:1, we published several such letters to help those inmates find correspondents. Due to a new initiative from the Central Office, Esperanto-USA is now establishing a new committee to create a more secure way to respond anonymously with inmates. Committee members will correspond via the CO address; personal home addresses will remain private.

Perhaps you're worried about your data being safe, and don't want prisoners to know your address. We at Esperanto-USA support and respect that choice, and recently the board has decided not to send out paper member lists starting in 2024, due to risk of misuse. We are working on changing to a more secure digital member list, by which we soon plan to better protect our members' data from undesired contacts. More details soon to come by email announcement. Inmates' contacts would be limited to only the Prisoner Relations Committee.

If you are already corresponding with an inmate, or are interested in doing so, we invite you to become a member of our committee. Contact us via the CO: amanda.schmidt@esperanto-usa.org.

li parolis kun junaj universitatanoj, li klarigis, ke ekzistas neniu argumento kontraŭ Esperanto, kiun ne povas refuti klera, informita proponanto de la lingvo, kaj pro tio ni havas eĉ moralan devon nin prepari por pozitiva interagado kun eksteraj individuoj kaj asocioj. Parto de nia kapablo daŭrigi nian agadon por Esperanto estas konvinkigo pri ĝia valoro kaj la nekontesteblaj avantaĝoj, kiujn alportas ĝia uzado al ni persone kaj al nia mondo. AMO-seminarioj provizas platformon, en kiu per kunlaborado ni reciproke helpas nin fariĝi pli efikaj konantoj de ĝiaj kvalitoj, kaj pli efikaj laborantoj por ĝiaj idealoj. Tra la jaroj, la edukado de nia komunumo tra la AMO-seminarioj estis plej diversa. Laŭ propra sperto kaj interesoj, la fokuso povas esti

- kiel pli bone lerni kaj instrui la lingvon,

- informiĝi pri argumentoj kontraŭ Esperanto kun praktika ekzercado pri tio, kiel rebati ilin,
- kiel labori por Esperanto en internaciaj organizaĵoj,
- la graveco de nia literaturo (legado kaj verkado), aŭ
- kiel verki proponojn por subvencioj.

Tiuj neniel elĉerpas la eblojn, kiel oni povas facile konstati rigardante la temojn de la pli ol cent seminarioj jam okazigitaj. Aktivula Maturigo: ĉu necesas? Kompreneble. Ĉu sukcesis? Juĝu la partoprenintoj, sed mi mem multon lernis de interagado kun profesiuloj kaj dediĉitaj spertuloj pri la kampoj esploritaj.

Ni daŭre utiligu niajn seminariojn por trejni niajn aktivulojn, kiuj siavice instruu aliajn kaj helpu pliefikigi ĉies laboron por nia lingvo.

Fine, elkoran dankon denove al Stefan kiel ĉefa AMO-organizanto, kaj al ĉiuj kunlaborintoj kaj partoprenintoj, kaj ni atendu la daŭrigon de konsciiga programo, kiu plisolidigis nian movadon kaj la kapablojn de nia komunumo. AMO kontribuas al ĉiuj kolonoj de la nuna strategia planado de UEA, KIRI: Kunlaborado (necesa por seminario kaj ĝiaj rezultoj!), Informado (evidente), Rilatoj (kun eksteruloj), kaj Instruado. Do eksterdube, plej kerna parto de nia laboro!

Ĉi tiu anonco estas adaptita de EKO, komunikoj de ILEI, laŭ ĝia permesilo [CC BY-SA 4.0](#).

Sep-Nov Board Activity

de la estraro

To conserve space, the newsletter includes only the minutes summary, and links, if available, to read the full minutes online. The full meeting minutes (including discussions) are available on E-USA's main website.

September

Proposal: That the Organization accept the draft version of the Finance Policy. Proposal passes by acclamation.

Proposal: That Esperanto-USA engage Garry Evans to join the Investment Committee as a consultant and allow him access to privileged information about E-USA through Dec 2025. engage Garry Evans to join the Investment Committee as a consultant and allow him access to privileged information about E-USA through Dec 2025.

October

Proposal: That the Bookmark Project requested by the Promotional Committee be approved to move forward, with expenses coming from the Publicity Fund and included in the 2025 budget. Motion passes by acclamation.

Proposal: That the board publish a dankrezolucio to Alekso MILLER for his work on the Usona Bona Film-Festivalo. Motion passes by acclamation.

Proposal: That the board review the draft agreement with KEA and provide comments prior to November 3rd, and that the Executive Committee be given authority to sign the document by November 10. Motion passes unanimously.

November

Proposal: To formalize the creation of a working group, consisting of Amanda Schmidt, Peggy Dolter, Fred Meyer, and Charlotte Burton, to create a charge for a proposed Prisoner Relations Committee. Motion passes by acclamation.

Proposal: That the board approves the below proposal documents as discussed in the Oct board meeting. These will inform part of our Form 990 which will be filed by Nov 15.

- Whistleblower
- Conflict of Interest
- Doc Retention and Destruction

The motion passes with a majority in favor.

Proposal: That the board approves the Dulanda Kongreso 2025 Agreement, as amended according to the board's input. The motion passes with a majority in favor.

Full meeting minutes can be found at:

esperanto-usa.org/en/category/meeting-minutes/

La vivo de Peĉjo

ŝercoj • Timothy BORONCZYK



Hundo en la parko

facila teksto • Lee MILLER

Hanna kaj Johano vizitis la urbeton kun siaj gepatroj. Ili promenis en granda parko, kie troviĝas multaj homoj ... kaj hundoj.

“Mi scivolas pri ‘nia’ hundo,” diris Hanna. “Ĉu ni iam vidos ĝin denove?”

Kaj ĝuste tiam ili rimarkis junan viron, ĉe kies flanko paŝas granda, bruna hundo.

“Ĉu nia?” flustris Johano.

Ili alproksimiĝis kaj karesis ĝin. La hundo rigardis ilin per dolĉaj okuloj, kiel ĉiu hundo.

Hanna klinis sin por refoje karesi la kapon, kaj la hundo kisis ŝian oreilon.

Survoje hejmen, ŝi pripensis la apenaŭ aŭdeblajn vortojn “Mi revidos vin baldaŭ.”

Politikoj — La kruroj sur kiuj neprofitcelaj firmaoj staras

de la kasisto • Matt Brooks



Politikoj povas ŝajni kiel administra ŝarĝo, sed por neprofitcelaj organizaĵoj, ili formas la infrastrukturon necesan por konstrui fidon, certigi konformecon, kaj plenumi ties mision. Financaj, investaj, kaj konformecaj politikoj, kiel la Politiko pri Konflikto de Interesoj, formas la fundamenton de bona administrado kaj travebleco. Ĉi tiuj povas rekte influi la fidon de donacantoj, leĝan konformecon, kaj la publikan percepton.

Financaj kaj investaj politikoj: gajnante la fidon de donacantoj

En mia rolo en la estraro, mi pasigis la lastajn monatojn esplorante plej bonajn praktikojn pri financoj kaj investoj por neprofitcelaj organizaĵoj (inkluzive kiel bone administritaj fondusojn) kaj konsultante fakulojn en la kampo. La estraro adoptis nian unuan oficialan Financan Administran Politikon¹ en Septembro. Post multaj intervjuoj kaj konsultoj, ni publikigis la Aldonon pri Investa Strategio en Decembro. Laŭ mi, estas tre grave konsulti homojn, kiuj laboras en rilataj kampoj aŭ havas profundan sperton pri ĉi tiuj temoj. Tiel kune kun miaj kunestraranoj, ni kreas politikojn kiuj taŭgas al nia organizaĵo kaj konformas al leĝoj kaj plej bonaj praktikoj.

Ĉi tiuj politikoj montras kiel ni prizorgas niajn rimedojn kaj kultivas ilin por antaŭenigi nian mision eduki pri Esperanto en Usono. Nia Investa Strategio utilas por gvidi nin respondece uzi la enspezojn de la fondusoj, dum ni poziciigas ilin por kresko. Tio certigas, ke la donacoj de niaj antaŭuloj daŭre puŝos nin antaŭen dum multaj jaroj.

Politiko pri konflikto de interesoj: etika administrado

La Politiko pri Konflikto de Interesoj² — kune kun aliaj konformecaj politikoj kiel la Politiko pri Informantoj³ kaj la Politiko pri Dokumenta Konservado⁴ — protektas la organizaĵon kontraŭ etikaj mispaŝoj kaj konservas publikan fidon. Ĝi difinas, kio konsistigas konflikton, priskribas paŝojn por malkaŝo, kaj certigas, ke decidoj estas liberaj de personaj interesoj.

Ekzemple, se estrarano havas financan rilaton kun provizanto, ili devas malkaŝi ĝin kaj sin deteni de la koncernaj decidoj. Tiu travebleco protektas la integrecon de la organizaĵo kaj utilas al la estraro plenumi sian devon agi laŭ la plej bonaj interesoj de la misio.

Rangigoj kaj reputacio: la efiko de GuideStar

Platformoj kiel GuideStar kaj Charity Navigator taksas neprofitcelajn organizaĵojn laŭ administrado, travebleco, kaj financa sano. Altaj rangigoj plifortigas la fidon de donacantoj kaj malfermas pordojn al subvencioj.

Lastatempe, la estraro kunlaboris kun profesiuloj por efektiviĝi ĉi tiujn **kvar ĉefajn politikojn** kaj **du aldonojn** por modernigi nian organizaĵan infrastrukturon. Ĉi tiuj politikoj — pri financa administrado, investoj, konflikto de interesoj, protekto de informantoj, kaj dokumenta konservado — plialtigis niajn rangigojn ĉe ĉi tiuj agentejoj. Tio poziciigas nin por fari niajn unuajn paŝojn al **subvencipetado venontjare**.

Politikoj estas promesoj

Politikoj ne simple temas pri burokrataĵoj — ili estas engaĝiĝoj al travebleco, etika administrado, kaj respondeca mastrumado. Ili montras al donacantoj, ke ties kontribuoj estas respektataj, certigas juran konformecon, kaj plibonigas la reputacion de la organizaĵo.

Dank' al la lastatempaj plibonigoj faritaj de la estraro, ni starigis pli fortan infrastrukturon por subteni kreskon, plenumi nian mision, kaj serĉi subvenciojn en la estonteco.

1. esperanto-usa.org/en/2024/09/22/financial-management-policy/
2. esperanto-usa.org/en/2024/11/13/conflict-of-interest-policy/
3. esperanto-usa.org/en/2024/11/13/whistleblower-policy/
4. esperanto-usa.org/en/2024/11/13/document-retention-and-destruction-policy/

Lavotaĵoj

beletre • Debra HAMEL

Starante ĉe la dormĉambra fenestro, Vilĉjo rigardis la domon, kiu alfrontis la lian. Ekde kiam li kaj Mara loĝis sur la strato, ĝi estis neloĝata. La domo malrapide maljuniĝis — soleca, li pensis — dum ĉirkaŭe familioj vivis kaj prosperis en pli amataj hejmoj. Malgraŭ ofta observado, li nur hodiaŭ rimarkis strangan aferon: Kvankam la domo estis kaduka, pendis malantaŭ la fenestroj kurtenoj, kiuj aspektis same puraj kvazaŭ ĵus aĉetitaj. Oni atendus, ke ili perdus koloron aŭ flaviĝus pro maljuneco, sed ne. Kurioze.

Mara marŝis enĉambren kun korbego de purigitaj vestaĵoj — malfeliĉa kiel kutime, li supozis. “Kial vi denove rigardas tiun domon? Ĉu vi ne havas ion pli gravan por fari?”

“Mi rimarkis ion,” li diris, kagestante al la kadukaĵo. “Kiu purigas la kurtenojn de tiu domaĉo?”

“Stulte,” ŝi diris. “Neniu purigas ilin. Neniu eniras tien.” Ŝi ekrigardis tra la fenestro. “Nu,” ŝi koncedis, “ili ja ŝajnas puraj, sed kompreneble ne estas.” Kaj paŝinte el la ĉambro ŝi laŭte aldonis de la korodoro, “Eble nun vi havas tempon por tondi la gazonon!”

Li rigardis ŝin foriri. Foje li demandis sin, kial li iam edzinigis ŝin, kaj kial li restis edziĝinta. Kaj foje li konkludis, ke la sola kialo estas, ke ŝi purigas la vestaĵojn.

Unu tagon post kelkaj semajnoj, Mara denove enĉambriĝis dum Vilĉjo staris ĉefenestre. “Nu,” ŝi diris. “Vi — eble por la unua fojo — pravis. Ili ja estas puraj.”

“Kio?!”

“Mi vizitis la domon dum vi laboris, fakte, plurfoje — kiam ajn la lavkorbo estis plena. Estas mirinde! La domo, nu, io eniras malpura — makula ĉemizo, ni diru — kaj preskaŭ tuj la malpuraĵo malaperas. Mi devas nur enporti lavotaĵojn, kaj la tasko estas farita.”

Mirigite, Vilĉjo ekpensis. Se oni povas tiel facile purigi vestaĵojn, kaj se la domo vere forigas makulojn — eĉ el sango, ekzemple — eble venis la tempo por fariĝi vidvo ...

Atentu! Enigmo-solvoj troviĝas sur la sekva paĝo!

The Language Corner with Lee Miller

About Compound Words

These are two (of several) basic principles for creating compound words (“kunmetitaj vortoj”) in Esperanto:

1: Two nouns can be combined to make a new word. For example, *rivero* + *bordo* = *riverbordo*. When that occurs, the second part is the primary one: a bank of a river, not a river of a bank.

When two nouns are combined, the first *-o* ending can either stay or go. Usually that decision depends on pronunciation. “Skribotablo” is easier than “skribtablo” for many people, although you’ll see both forms.

2: Ordinarily, an adjective isn’t combined with the word it modifies. So “bona tago” doesn’t become “bontago”, and “bela infano” doesn’t become “belinfano”.

When an adjective is combined with a noun, it creates a new word with a new meaning. So “bonveno” (*bona* + *veno*) doesn’t mean “a good coming” but “a welcome”. “Belarto” doesn’t mean “beautiful art”, but means “the fine arts”.


Eta urso en biblioteko

loke • Ellen EDDY

Pli frue en la jaro, loka klubo Dolls and Toys Northwest en Lacey, Vaŝingtonio faris montradon de libroj, kune kun la pupoj aŭ ludiloj, kiuj ĉefrolas en tiuj libroj. Mi hazarde havis la etan urson kaj, nature, la libron Winnie la Pu. Mi scivolas, ĉu oni rimarkas ĝin inter la anglalingvaj libroj?



(De la antaŭa paĝo — jen ĝi!)



Solvoj de enigmoj el n-roj 2024:2, 2024:3

Jen la solvoj por ĉiuj enigmoj aperintaj en la antaŭaj du numeroj!

Dankon kaj laŭrojn al kaj Rafa NOGUERAS kaj Madeleine CANAVESE, kiuj ambaŭ ĝuste solvis 1905 kaj Okazas! Pro tio, ambaŭ ili ricevas kvin-dolaran butik-rabaton. Por la aliaj du enigmoj la redakcio ne ricevis ĝustan solvon.

Pro limigita tempo, ne estas nova enigmo ĉi-numere, sed ni antaŭĝojas prezenti al vi novajn en 2025!

La Zamenhofa Dimensio (2024:3)

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10				
P	U	T	R	I	Ĝ		K	A	B	L			
11	A	L	R	I	D		12	O	L	E	O		
13	K	N	E	D	A	S		14	J	E	L	P	
15	T	O	F	U		16	17	L	A	N	U	G	
					18	G	A	Z	E	T			
				19	K	A	R	E	O				
			20	F	A	D	E	N					
	21	N	E	P	O	V		22	M	O	S	K	
26	T	A	T	U		27	28	I	D	I	S	T	A
29	A	Z	O	T		30	D	I	R	T	A	J	
31	R	A	R	A		32	O	K	T	A	N	T	

1905 (2024:2)

	1	2	3	4						
	T	R	A	F						
	5	R	E	V	U		6	7	8	
	A	S	E	N			E	C	O	
	9						10			
	G	A	R	D			K	I	N	
	11						12			
							O	V	O	
	13	E	L	S	A	R	K	I		
	15	I	D	U		16	M	A	A	T
	17	L	I	T		18	E	D	Z	A
	19	Z	O	O		20	N	I	A	N
						21	T	A	S	O

Laŭdu la tagon nur vespere (2024:2)

1	2	3	4	5	6	7	8	9		
F	A	N	F	A	R	O	N	U		
10	A	K	O	R	D	E	K	U	N	
11	G	I	T	A	R	L	U	D	I	
	12	R	I	T	E		13	P	I	O
			14	O	N	D				
	16	17	18		19	20	21			
	P	I	G		A	R	E	T		
	22	I	D	E	O	L	O	G	I	E
	23								24	
25	R	E	A	L	I	G	A	N	T	
26	R	E	V	E	N	A	N	T	E	

Okazas (2024:2)

		1	2	3								
		I	A	M								
	4	5	S	E	K	V	E	D	E			
8	S	I	S	T	E	R	O	N	A			
10	L	A	P		11	N	O	M	B	R		
12	A	L	E	R		14	P	I	L	A		
15	V	O	R	A	S		16		17	C	O	L
18	A	K	U	Z	A	T	I	V	O			
	20	A	S	I	M	I	L	I				
			21	L	I	P						

USS *Wisconsin*


historie • Logan HALL

kanelo: helica kanalo entajlita en la interno de pafiltubo por rotaciigi kaj stabiligi kuglon.

tribordo: la dekstra parto de ŝipo, kontraste al la maldekstra (babordo).

pruo: la antaŭa parto de ŝipo, kontraste al la malantaŭa (**pobo**).


spavo: SenPilota AViadilo; droneo.



Bedaŭrinde mi ne povis partopreni la antaŭkongresajn ekskursojn en Losanĝeleso ĉi-jare; la sorto venigis min al Virginio, kie mi gastis kun amikoj dum tiu semajno. Inter vizito al farmbieno, gustumado de hejmfaritaj bieroj kaj mielakvoj, kaj granda festo por la usona nacia tago, ni dankinde havis multajn proprajn ekskursojn; tamen mia plej ŝatata estis en la urbo Norfolk, kie restas la legenda usona batalŝipo USS *Wisconsin*.

Ĝi apartenas al la klaso *Iowa*, kiu konsistas el la ŝipoj *Iowa*, *New Jersey*, *Missouri* kaj *Wisconsin*, en tiu ordo. Ĉiuj ili estis konstruitaj inter 1940 kaj 1944. Du pli estis konstruataj — *Illinois* kaj *Kentucky* — sed poste nuligitaj kaj dispecigitaj. La klaso partoprenis kaj tute travivis la duan mondmiliton, kaj la 20-jarcentajn militojn en Koreujo, Vjetnamujo, Libano, kaj la Persa Golfo. Hodiaŭ ĉiuj kvar estas muzeaj ŝipoj, malfermitaj al la publiko.

Norfolk estis tri horojn de tie, kie mi gastis, do ni planis pasigi la tutan tagon tie. *Wisconsin* estas prizorgata de la muzeo Nauticus, kiu havas ankaŭ aliajn ekspoziciojn



por okupi la tempon, inkluzive unu pri kirasŝipoj (angle *ironclads*). Historie, la unua batalo inter du kirasŝipoj okazis en 1862 ĉe Hampton Roads, Virginio dum la usona enlanda milito, inter la konfederacia CSS *Virginia* kaj la unia USS *Monitor*. Kiel ‘prabatalŝipoj’, ambaŭ profunde ŝanĝis la estontecon de marmilito, portantaj respektive novajn teĥnologiojn. Interalie, *Virginia* havis **kanelitajn** kanonojn (pli potencajn) kaj klinan kirason (pli fortikan), dum *Monitor* havis rotacipovajn kanonojn (tureton) kaj aparatojn plimulte protektitajn en subakva etaĝo. Efektive neniuj iliaj teĥnologioj estis inventitaj en Usono, sed plejparte en Britujo kaj Francujo; tamen ilia batalo estis la unua ampleksa testo de modernaj militŝipoj. La paro estis tre egala inter si; la kirasŝipoj ne povis sinkigi unu la alian, kaj la batalo finiĝis sen venko.

Tiu parto de la muzeo servis kiel bona apetitveko por la ĉefa ekspozicio, USS *Wisconsin*. Ni transpasis la ponton al ĝia **tribordo**, rekte frontantaj ĝian plej antaŭan tureton. Mi tuj marŝis laŭ la longo de ĝiaj pafiloj, mirante pri la grandeco. Mi rimarkis, ke la pafiltuboj estas ŝtopitaj per korkoj. Jam proksimaj al ĝi, ni pluiris al la **pruo**, de kie estas videbla la urbocentro de Norfolk, inkluzive plurajn ĉielskrapantojn. Ni ŝercis, ke eble tiuj firmaoj diras al siaj staĝantoj, “*Atentu tiun batalŝipon el la fenestro. Ĝiaj kanonoj rigardas nian konstruaĵon, kaj ili ekpafos, se vi fiaskos!*” Du el miaj amikoj rekreis por foto la faman pozon el Titanic antaŭ ol ni revenis al la cetero de la ŝipo, preterpasante la grandajn ankroĉenojn.



Restis horo ĝis nia gvidita vizitado, kaj ni trovis pardonon malfermitan ĝuste antaŭ la dua tureto. Supozeble, ili ne lasus malfermita pardonon en loko kun vagantoj, se oni ne rajtus eniri — do ni eniris. Tuj estis ŝtupetaro por konduki nin sub la ferdekon, kie ni vidis dormejojn kaj vestejojn, kaj longegajn koridorojn. La sojloj estas tre altaj — preskaŭ al la genuoj — por gardi kontraŭ eventuala akvo, do pordojn ni devis transpaŝi prudente; tiam ni rimarkis, ke la konservistoj fiksas kusenetojn al la plafono, por protekti la kapon. La muro plenis de multspecaj aparatoj — valvoj,



tubetoj, mezuriloj, ktp — kaj ankaŭ de kontroldokumentoj; unu estis datita 31 Januaro, 1991, ĝuste antaŭ la servofino de *Wisconsin*. Iam ni vidis aperturon en la planko, kovritan de vitro, super ŝakto tiel profunda, ke ni ne povis vidi la fundon.

Ŝance ni trovis la ŝipan malsanulejon, inkluzive oficojn, duŝojn, izolejon, kaj operaciejon. Tiu lasta ĉambro havis severan atmosferon; mi penis imagi, kiaj malbonaj cirkonstancoj kondukis ŝipanon al ĝi. La etoson mildigis la apuda ĉambro, kie staras modela skeleto kun kuracista jako kaj sunĉapelo. Serĉante elirejon — iom perdiĝinte — ni trovis ekster la kliniko ian puton, en kiun oni estas kuraĝigita ĵeti moneron laŭ tradicio, kaj enfine aperis la komuna manĝejo kaj suvenirvendejo.



De tie ni revenis al la surfaco je bona tempo por atendi nian ĉiĉeronon, Marty, kiu servis en la usona mararmeo kiel komandoro en medicina korpuso. Post sia sinprezento, li akceptis nin en ĉambron relative luksan. Ĝi estas salono kun komfortaj kanapoj, blua tapiŝo, kaj muroj ornamitaj per fotoj de antaŭaj kapitanoj. Ankaŭ estas kunsidotablo, sufiĉe granda por ok seĝoj; Marty eksplikis, ke ĉi tiu estis la kunsido-ĉambro por gravaj vizitantoj, ekzemple ŝtatestoj kaj admiraloj.


Sekvis laŭŝajne la plej komforta dormejo en la tuta ŝipo, konsistanta el unu granda lito, vestoŝranko, kaj skribotablo. Ekster batalkondiĉoj, tie dormis la kapitano, aŭ fojfoje eminenta gasto. Konektita al tiu ĉambro estas la sola privata necesejo kun propra duŝo. Marty rakontis, ke nur unu banujo troviĝas sur usona militŝipo — kutime oni evitas malŝpari spacon tiel, sed unu estis metita en tiu sama necesejo en *Iowa* por akomodi al la tiama prezidento Franklin D. ROOSEVELT, pro lia paralizo.

Poste ni vidis la privatan manĝejon, kun servo surtabla. Fakte, la aktuala neniam estis uzita; *Wisconsin* ĉiam havis tian apartan manĝejon por admiraloj kaj aliaj gastoj, tamen ĝi antaŭe troviĝis en tute alia parto de la ŝipo. Kiam *Wisconsin* estis renovigita inter 1987-1988, la novaj armiloj bezonis okupi ĝian spacon, do la manĝejo estis movita al la aktuala loko.



Ĝi pretis akcepti gastojn, sed neniam faris ĝis la servofino. En apuda ĉambro estas la gastolitoj.

Supre de kelkaj ŝtupetaroj, ni eniris la precipan ĉambron de la vizito: la batalcentron. Estas kelkaj malplenaj spacoj, kie iam restis aparatoj, kiujn la usona mararmeo decidis forpreni, ĉar ili ankoraŭ uziĝas en aliaj ŝipoj. La ceteraj bone montras la aĝon de la ŝipo, nun okdekjaraj. En la mezo restas seĝo pli alta ol ĉiu alia — tie sidis la oficiro kun sola aŭtoritato permesi kaj ordoni uzon de armiloj. Laŭrakonte, eĉ la kapitano mem ne havis tiun povon; li nur nomumis tiun oficiron. Subite aŭdiĝis sonregistraĵo de ŝipanoj plenumantaj siajn rolojn en tiu ĉambro; lumoj ekbrilis super la diversaj postenoj por montri, ĉe kiuj aparatoj ili laboris. Tio estis vera registraĵo de servanta *Wisconsin*, kiam ĝi observis, kaj enfine pafdetruis, fremdan **spavon**. En alia okazo, *Wisconsin* uzis propran spavon en unu el siaj plej famaj momentoj, kiam en 1991 batalantoj kapitulacis, la unuan fojon en historio, al senpilota aviadilo regata de ŝipo. Marty rimarkigis la absurdecon de tiu situacio: kiam oni rezignas al spavo de ŝipo tre for, kiu akceptos la rezignantajn? (*Wisconsin* vokis la usonan terarmeon por helpo, kaj estis embaraso, kiam la kvanto de kapitulacantoj estis dekoble pli ol unue rimarkite.)



Marty turnis nin al aparta flanko de la ĉambro kun antikvaj komputiloj. “Tiuj komputiloj regas la misilojn. Kaj, se vi estas atentema, vi rimarkos etikedon sur ili, kiu diras ‘NUKLEA’. Nu, se vi demandas ĝin, la usona mararmeo nek konfirmas nek neas la ekziston de nukleaj armiloj sur siaj ŝipoj. Tamen, *se estus* nukleaj misiloj sur la ŝipo...” Ni ridis. “Por lanĉi ilin necesus du apartaj ŝipanoj, ambaŭ havantaj unikan ŝlosilon, kiuj devus veni kaj enmeti siajn ŝlosilojn tie samtempe. Tria persono havas pasvorton por entajpi. Parenteze, pri tiuj ŝlosiloj, mi havas unu ĝuste en miaj manoj.” Li levis kaj montris al ni, ankoraŭ ridantaj. “Vi eble imagis ion enigman aŭ kompleksan, sed ne — ĝi estas pli simpla ol domŝlosilo. Ĝi ne plu utilas — la sistemo ne plu funkcias — sed ĉi tio estas vera ekzemplero de tiu tempo.”

Mi devas supozi, ke li havis la rajton kaj aprobon prezenti la aferon tiel; aliokaze li ne havus la ŝlosilon, kaj la mararmeo forprenus tiujn komputilojn, aŭ almenaŭ la etikedojn, kiuj tekstas ‘NUKLEA’. Estis pli konsterna imagi, kiujn aparatojn ĝi ja forprenis, se ne aludojn al nukleaj armiloj.

Finfine ni atingis la komandejon. Kiel kutime en ŝipoj, ĝi konsistas el fenestroj, diversaj instrumentoj kaj komunikiloj por navigacii. Ankaŭ tie estas la *citadelo* — cilindra ĉambro ĉirkaŭata de nekredeble dika metalo, je pli ol unu futo. Tien iris la ŝipestroj dum batalo aŭ danĝero — ĝi havas ĉiujn necesajn aparatojn por ankoraŭ regi la ŝipon. En bona vetero (nek pluvo nek kuglo), ili povis regi la ŝipon de la ferdeko unu etaĝon supre, en la suno. Tie oni bone vidas la pruajn turetojn; laŭ Marty, la naŭ kanonoj de *Wisconsin* bezonis po ses sakojn da pulvo por ĉiu pafo — usonanoj mezuras ĉiel ajn krom per kilogramoj — kaj povis esti reŝargitaj de lerta maristaro plej rapide en 30 sekundoj, pli ofte en 60.



La lasta parto prezentita de nia ĉiĉerono estis la pli modernaj armiloj post renovigo — la lanĉiloj por misiloj *Tomahawk*, en kiuj li denove atentigis nin pri subtila teksto — ‘NUKLEA’. Unu lanĉilaro estas levita, rigardanta la ĉielon, kaj alia havas malfermitan panelon por montri la cirkvitojn kaj dratojn. Ni dankis lin pro la prezento, kaj rapidis al la **pobo** antaŭ ol adiaŭi la ŝipon. Survoje ni vidis ion tre neatenditan. En humila angulo de hazarda ekstera koridoro kuŝas ŝildo kun la mirinda teksto:



Ĉi tiu ŝildo markas la lokon, kie, la 15-an de Marto, 1952, dum operaco en la areo de Songĝin [Kimĉekurbo], Koreujo, fremda marborda baterio rekte trafis, vundante tri ŝipanojn[.]

Laŭ Vikipedio, tio estis la unua trafo al *Wisconsin*, kaj la tri ŝipanoj plu vivis. Iu ajn difekto estis delonge riparita, tiel ke oni ne rimarkus trafon sen tiu ŝildo.

Militŝipoj interesas min. Marbatalaj ludoj estas inter miaj plej ŝatataj — *Battleship*, *World of Warships* kaj *Sea of Thieves*, interalie. Pro tio, al miaj amikoj mi estas konata kiel “la boatulo” — tial ili proponis iri kun mi al USS *Wisconsin*. Mi ĝojis pri la oportuno kaj gajis dum la tuta vizito.

Tamen, tiaj ŝipoj kaŭzas en mi ankaŭ konflikтан senton. Ĉu mi povas aprezi maŝinon destinitan por milito? Estas ironio, ke ni tiel ridis pri la vualaĉo de nukleaj armiloj, vere


terura afero. Starante sur militŝipo, oni devas konscii, ke ĝi estigis viktimojn.

Estas tamen alia flanko. La plej fama faro de la tuta klaso *Iowa* estas fakte ne batalo, sed fermo de milito — la kapitulaco de la Japana Imperio, subskribita sur USS *Missouri*, kiu ricevis tiun honoron laŭ ordono de la tiam prezidento Harry S. TRUMAN — la sola el Misurio, mia hejmsŝtato. Tial mi sentas apartan estimon por la klaso.

Post domaĝo venas saĝo, Zamenhof skribis. Mi bedaŭras, ke milito estis la fono de ĉi tia ŝipo, sed militon forlasis ĝi; restas la konstruo, kaj la historio. Same mi bedaŭras, ke ne restas la japanaj batalŝipoj kiel Jamato, Musaŝi kaj aliaj, ĉar mi nepre volus viziti ankaŭ ilin. Eble ni laŭdu la fakton, ke la solaj batalŝipoj restantaj en la mondo estas muzeaj — nur memorajoj el pli sanga, pli imperiisma epoko.


Pelarboj

senintenca esperantaĵo • Logan HALL



Jen krajon-aspekta lampo, kiun mi trovis ĉe IKEA. Ĝia nomo, *Pelarboj*, signifas en la sveda ne ‘krajonon’, sed ‘piliar-buon’ (*pelar* + *boj*) — aŭ bonlingvisme, ‘kolonnaĝbarelon’. Estas ridige tamen imagi arbaron, kiu pelas promenantojn hasti!

Jen amuza fakto: eĉ Google Translate supozas, ke la teksto “*pelarboj*” estas esperanta! Tamen, ĝi tradukas tiun vorton kvazaŭ ĝi estas ‘pelargonio’.




Mikronoveloj

Por tiu ĉi rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero! Redaktas la mikronovelojn Hoss FIROOZANIA kaj Rafa NOGUERAS kunlabore kun la redakcio.

La kristala anaso

Timothy BORONCZYK

La fina varo de la bonfara aŭkcio estis kristala anaso kun malfeliĉa historio — ĉiu antaŭa posedanto neatendite mortis. La komenca prezo: 70 000 spesmiloj.



“75 000... 80 000... 100 000...” La proponoj rapide kreskis.

“200 000... 350 000... 500 000...” Kuraĝigis la aŭkciisto, “Forgesu la onidirojn kaj superstiĉon!”

Kun aroga certeco, juna entreprenisto proponis unu milionon da spesmiloj. Neniu aŭdacis proponi pli.


La entreprenisto triumfe prenis la anason. Sed post kelkaj momentoj, trafis lin koratako.

La aŭkciisto senemocie remetis la anason sur la piedestalon, zorge evitante la lokon, kie li antaŭe surmetis la rapidefikan venenon. “Ŝajne ni havos plian grandan mondacon venontjare,” li murmuris al si mem.

Senmakula vizaĝo

Timothy BORONCZYK

En mondo, kie ĉiu elbuŝigita mensogo markis sian parolanton per cikatro, la sencikatra vizaĝo de Eriko Nubkovo klare kontrastis kun tiuj de la aliaj politikistoj. Li fariĝis simbolo de neŝanceblebla honesto, kaj lia kandidatiĝo kaptis la atenton de la tuta lando.



Antaŭ lia unua debato kun siaj kontraŭuloj, la aŭditorio zumis per ekscitiĝo. Gvidanto solene bonvenigis la kandidatojn, kaj la voĉo de Nubkovo, klara kaj fidinda, plenigis la ĉambron. “Dankon. Estas granda honoro partopreni.”

Post starigo de la unua demando, la aŭskultantoj profundigis en silenton kaj kliniĝis antaŭen kun kreskanta scivolo. Nubkovo lerte ekrespondis ... per la graciaj gestoj de signolingvo.

La fina venko

Debra HAMEL

“Ili koleras,” Susan diras, legante afiŝojn en retgrupo de najbaroj. “Ili akuzas unu la alian. Baldaŭ ekflamos milito.”

“Mi ne pensas—” Rocky komencas.

“Ne pensu!” ŝi interrompas. “Mi havas cerbon; vi—”

“Forton?”

“Ne precize. Manĝu.”

Aliulo ofendiĝus, sed Rocky estas bona subulo. Li manĝas. Susan ordonis al li manĝi trioble pli ol kutime.

“Agu ĉi-nokte. Trafu kiel eble plej multajn gazonojn.”

Rocky maĉante kapjesas.

“Inter najbaroj, neniu estas pli abomenita ol hundpromeniganto kiu ne forigas fekon,” ŝi diras. “Post viaj kontribuajoj, sango fluos. Tiam, ni liberiĝos. Neniu denove malebligu al mi kuŝi surtable!”

Ŝi lekas la piedon ronronante.

La fina venmo

Debra HAMEL

Li respondas la telefonon malgraŭ suspekto, pri kio temas.

“S-ro Bein,” diras junulo. “Telefonas Derek, de la abono-fako de La Verda—”

“Mi denove sciigas vin: Mi nuligis la abonon!”

Derek persistas. “Ni ne ricevis vian abono-pagon. Kutime vi pagas per Venmo. Ĉu tiu rimedo ankoraŭ konvenas?”

“Diable!”

“Nekabeantoj ricevos donacon.”

Bein hezitas. “Ĉu ... kalendaron?”

“Jes! Kun bildoj de samideanoj surhavantaj nur ... nu—”

“Ne diru plu!” La embaraso de la knabo sufiĉe evidentiĝis. “Mi tro hastis. Fakte la gazeto plaĉas al mi, kaj via donaco ... estus bonvena. Mi reabonos. Ĉi-foje. Sed je la barbo de Zamenhof, tio estos la fina Venmo!”

Kolofono

Usona Esperantisto estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 200–1600 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun viaj nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redakcio aŭ de Esperanto-USA.

Sendu kontribuojn al bulteno@esperanto-usa.org.

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

La limdato por artikoloj en N^o 2025:1 estas la **15-a de Marto**. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon en la bulteno kaj en aliaj eldonaĵoj. Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.


Redakcia teamo: Alena ADLER kaj Logan HALL.

Aŭtoroj (ordigitaj laŭ apero)

Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel programisto.

<tboronczyk@gmail.com>



Debra HAMEL

Debra estas verkisto de pluraj libroj pri antikva Grekujo (en la angla). Ŝi loĝas en Konektikuto, Usono.

Matt BROOKS

Mateo BROOKS ekstudis Esperanton en 2017 kaj pasie verkas poezion, kiun li lastatempe adaptas al kantoj per artefaritaj intelektoj kiel Suno. Li parolas kvar lingvojn kaj studas multajn aliajn per platformoj kiel Duolingo. Kun pli ol dek jaroj da sperto en estraroj de neprofitcelaj organizaĵoj kaj pli ol dudek jaroj en financaj kaj teknologiaj postenoj ĉe grandaj firmaoj, li kontribuas kiel Kasisto de E-USA per vasta scio kaj sperto. Liaj literaturaj verkoj haveblas ĉe blog.brooksny.net.


<matt.brooks@esperanto-usa.org>



Lee MILLER

Liĉjo is a member of the Akademio de Esperanto, is an expert Esperanto instructor, and has been the main administrator of the Duolingo Esperanto Learners Facebook group since its inception in 2015.


<licxjo@gmail.com>



Logan HALL

Lojo konsistigas duonon de la redakcio de *Usona Esperantisto* ekde 2024. De 2020 ri estas administranto de la plej granda esperanta komunumo ĉe *Discord*. Profesie ri laboras kiel analizisto pri ciberminacoj.

<logan.hall@esperanto-usa.org>



Ankaŭ aŭtoris: **Ruth "Margo" KEVESS-COHEN**, **Karlo GERMANY**, **Duncan CHARTERS**, **Matt BROOKS**, **Ellen EDDY**

Se vi kontribuas al *Usona Esperantisto*, sendu al la redakcio biografieton kaj foton, por ke ili aperu jen!

